Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**20-a de julio 2020, numero 3**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Unua rigardo al la programo de la Virtuala Kongreso

Amri Wandel

La Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) ofertos riĉan programon. La Virtuala Kongresa Komitato (VKK) streĉe laboradas por plej bone ĝin efektivigi, ĉar por prepari UK oni bezonas du jarojn, dum ni havis apenaŭ du monatojn.

Detala program-skemo kun laŭtaga kaj hora disdivido de la diversaj programeroj troviĝas en Eventa Servo: eventaservo.org/e/VK. Kvankam ankoraŭ povas okazi iuj ŝanĝoj kaj aldonoj, ni opinias ke pli utilas prezenti malnetan programon nun, ol perfekte pretan version en la lasta momento.



La VK-programo ĝenerale sekvas la konatan strukturon de la UK. Tamen estas pluraj diferencoj: la *kerna programo* okazos inter 12h–18h UTC. Ĝi inkluzivos tradiciajn UK-programerojn, kiel la Kongresa Temo, Tago de Lernado kaj Internacia Kongresa Universitato (IKU), Aŭkcio kaj Akademio de Esperanto.

Iuj tradiciaj programeroj tamen okazos en nova, foje surpriza, virtuala formato. Ekzemple, anstataŭ la Ekskursa Tago okazos virtualaj ekskursoj tutmonde, kaj la bankedon anstataŭos virtualaj pladoj de la mondo. La (virtuala) Movada Foiro okazos dum la tuta VK-semajno, en la du horoj antaŭ aŭ post la kerna programo.

Kulturaj kaj artaj programeroj, kiel *Internaciaj Artaj Horoj* kaj *Aŭtoraj Momentoj* okazos plurfoje dum la semajno. Aliaj konataj UK-programeroj, kiel la Belartaj Konkursoj kaj pliaj kunsidoj de la Komitato okazos post la VK, kadre de MondaFest'.

Daŭre bonvenas proponoj (ekzemple kunvenoj de Fakaj Asocioj, kontribuoj por la internaciaj arta programo kaj objektoj por la Aŭkcio), ĉe la retadresoj vkk@esperanto.org kaj mondafest2020@googlegroups.com.

Laste kaj ne balaste: por partopreni necesas **registriĝi** ĉe vk.mondafest.net, kio **ĝis 26.07** estas senpage por la individuaj membroj de UEA. En la sama retejo eblas tuj aliĝi al UEA, se vi ne jam estas membroj por 2020. Ne maltrafu tiun historian Kongreson, kiu estonte eble spronos novan tipon de hibrida UK, virtuala kaj ĉeesta.

Antaŭ kelkaj tagoj la Montreala LKK sendis la Poŝtkartojn de Espero al la unuaj 12 donacantoj por la kampanjo "2022 por 2022". La poŝtkartoj iros al Italio, Usono, Britio, Japanio, Kanado kaj Francio, kaj iom poste (kiam la poŝta servo renormaliĝos) ankaŭ al Brazilo kaj Dominika Respubliko. DANKEGON AL ĈIUJ, KIUJ JAM DONACIS! Dank'al vi, ni jam atingis duonon de nia celo: 2022 eŭroj por Montrealo-2022. Pliaj donacoj tre bonvenas! https://esperanto2020.ca/eo/posxtkarto/



# Ĉu la fino de virtuala AMO?

Stefan MacGill

La lasta fizika seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) okazis en Aŭklando, Nov-Zelando en januaro 2020. Pozitive evoluos la planoj, la sekva fizika seminario okazos fine de oktobro 2020 en Francio, ne malproksime de la antipodo de Nov-Zelando. Jen detaloj pri la ĵusaj kaj sekvaj seminarioj:

**AMO 64** pri la Faka Agado (la 9-a de majo) atingis unuafojan rekordon. La AMO-administrejo ricevis kaj diskonigis ene de tagoj ĉiujn el la kontribuaĵoj – rekordo neniam atingita nek pli frue nek pliposte.

**AMO 65** havis temon: 'Landaj Asocioj – Leviĝantaj Agantoj'. Tio okazis en la 27-a de junio. Gvidis la malfermon Jérémie Sabiyumva, la estrarano de UEA respondeca pri la programo. Disiris du kontribuaĵoj, la enkonduka lumbilda prezento de Stefan MacGill kaj la prezentaĵo de Jose Antonio del Barrio pri la nuna agado en Hispanio. Entute seso da homoj prezentis sian landan agadon.


**AMO 66** okazos en la 31-a de julio, kadre de la Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI (VEKI). La temo: 'Instruistoj – iliaj roloj, taskoj kaj respondecoj'. La detala programo estas delonge konata, kun du instigaj forumoj, kun partopreno de elstaraj edukistoj. Vidu la programon en EKO 38, aŭ ĉe

www.ilei.info.

**AMO 67**, la kvina el la virtualaj AMO-seminarioj, okazos en Vroclavo, Pollando la 13-an de septembro. La ĉeftemo estos: 'Varbado de junuloj en Eŭropo'. Tio turnas la fokuson de la pli vasta temaro de la 65-a seminario al la ege urĝa tasko reekvilibrigi la aĝstrukturon de la esperantistoj en Eŭropo, precipe tra Skandinavio kaj la Balto. Inter la subtemoj troviĝos debatoj pri la aktivigo kaj subteno por landaj kaj lokaj agantoj.

**AMO 68** estas planata por la unua seminario depost januaro kun fizike ĉeesta partoprenantaro – eble suplemente al reta formo. La seminario okazos en la kulturcentro Greziljono en la lasta semajno de oktobro. Restas difini temon kaj precizajn datojn.

Restas la eblo por unu jarfina seminario – ĉu ĉeesta, ĉu virtuala, ĉu hibrida. Proponoj estas bonvenaj.


La nuligo de la ĉi-jara IJK ne estu kialo ne (r)esti en kontakto kun la kulturo de la gastigunta lando: dum la tuta monato aĉetu Nederlandan antologion kun triona rabato sendepende de kvanto. Aĉetu ĉe UEA


# Alvoko por la Oratora Konkurso

Kiel parto de la Virtuala Kongreso okazanta en la kadro de la Monda Festivalo de Esperanto 2020, denove okazos Oratora Konkurso por la junularo.

La konkurso okazos en du sesioj:

- elimina sesio: malferma al ĉiuj partoprenantoj, ĝi okazos ĵaŭdon, la 30-an de julio, 11:00-16:00 UTC.
- fina sesio: la kvin plej elstaraj konkursantoj revenos sur la virtualan scenejon denove merkredon, la 5-an de aŭgusto, de la 15:00 ĝis la 16:00 UTC, por decidi la tri premiotojn.

La konkurso estas malferma al la partopreno de gejunuloj en TEJO-aĝo kiuj aliĝis al la kongreso. Partopreno estos senpaga, sed la kandidatoj devos skribe anonci sin minimume unu tagon antaŭ la elimina rondo al la estrarano pri kulturo Orlando Raola, kiu kunorganizas la eventon (*oraola@gmail.com*).

La partoprenantoj de la Oratora Konkurso devas elekti unu el la jenaj temoj:

- Kiam mi estis infano, mia plej kara revo estis...
- Mi neniam komprenis kial ...
- Mia plej rimarkinda sperto pri virtualaj eventoj estas…




La parolado daŭros ĝis 10 minutoj, en la Internacia Lingvo Esperanto. La kandidatoj devas paroli libere, sen anticipe skribita teksto, sed ili povas uzi memorigajn notojn. La paroladojn oni taksos el vidpunktoj enhava, lingva kaj stila, kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro.

La juĝkomisiono ĉi jare konsistas el: Giridhar Rao (prezidanto), Mark Giraud (membro), Leandro Abrahão (membro kaj teknika prizorganto) kaj Duncan Charters (anstataŭanto).

La juĝkomisiono aljuĝos tri premiojn: unua premio senpaga aliĝo al la UK en Belfast 2021, laŭ kategorio A en la frua aliĝperiodo aŭ 100 eŭroj, dua premio 75 eŭroj kaj tria 50 eŭroj, ĉiuj monsumoj liverotaj kiel aĉetkuponoj por la asocia Libroservo.

La organizantoj bondeziras al la kuraĝuloj kiuj partoprenos, kaj esperas, ke tiu ĉi kongresero estos tiel populara kaj amase spektita, kiel estas tradicie.

Kompleta regularo de la konkurso troviĝas en la retejo de UEA.

# Kelkaj programeroj de la estonta Virtuala Kongreso

Sekvu novajn numerojn de la *Festivla Kuriero,* kie ni daŭrigos publikigi la anoncojn.




Ĉu Esperanto estas vere facila? Kiel eblas sukcese instrui kaj lerni ĝin? Pri siaj spertoj rakontas eble la plej famaj instruistino kaj lernantino de nia lingvo dum la Virtuala Kongreso de #Esperanto (VK), kiel parto de la Tago de Lernado, kunlabore kun ILEI.




La prezidanto de ILEI, Mirejo Grosjean, malfermos la Tagon de Lernado de la Virtuala Kongreso de #Esperanto (VK). Aliĝu al la VK por spekti ŝian interesan prelegon kaj multajn aliajn!




Rajtoj de infanoj gravas! Monika Molnar prezentos la rilatojn inter tio kaj lernejoj en la Tago de Lernado dum la Virtuala Kongreso de #Esperanto (VK). Aliĝu al la VK por spekti ŝian gravan prelegon kaj multajn aliajn!




Fabeloj ligas popolojn kaj estas grava ilo por krei pontojn de dialogo, interkompreniĝo kaj paco. Anna Striganova regalos nin per tiutema prelego dum la Virtuala Kongreso de #Esperanto (VK), kiel parto de la Scienca Kafejo: aliĝu! Senpage por IM-oj de UEA ĝis la 26-a de julio!

## Esperanto en Universitatoj

Kadre de **#MondaFest' 2020**, la Irana Esperanto-Asocio (IREA) okazigas serion de la programeroj kun la titolo "Kunpens(ig)ado: Esperanto kaj Universitatoj". La 4-a sesio okazis la 20.07.2020. Vi povas spekti registraĵon de la tuta evento, kiu daŭris preskaŭ du horojn, ĉe jutubo: https://youtu.be/u3vEbe5tBXs



# Alvoko al Kunmanĝado tra la Mondo

Unu el la tradiciaj eroj de la Universalaj Kongresoj estas la bankedo. Estas facile konstati, ke kunmanĝado estas unu el la plej bazaj kaj unuecigaj manieroj kunesti por homoj de ĉiuj kulturoj, de ĉiuj anguloj de la planedo kaj tra ĉiuj historiaj epokoj de la homara evoluo. Sed en la jaro 2020 ni alfrontas la eksterordinaran defion kreitan de pandemio, kiu aparte limigas la eblecon kunesti kaj kunmanĝi. La organizantoj de tiuj ĉi eventoj decidis trovi kreeman manieron festi nian homecon kaj festeni en la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK): https://vk.mondafest.net/. UEA invitas vin ĉiujn partopreni la aranĝon "Kunmanĝado tra la Mondo", okazontan la 5-an de aŭgusto, merkredon, 16:00-18:00 UTC.



Dum tiu ĉi tempo la partoprenontoj montros al la cetera mondo kiel ili festas per manĝado de luksaj pladoj en hejma etoso kaj kiel la manĝaĵoj estis preparitaj (espereble diskonigante la receptojn). Kompreneble pro la diferenco en la loka horo por ĉiuj partoprenantoj tiu hejma kunfestado povos esti de frua matenmanĝo ĝis plej malfrua vespermanĝo, kio ne estas malhelpo, sed donos pli da vario al la tuta aranĝo.

La organizantoj de la programero petas proponojn por partopreno en la aranĝo. La apartaj eroj daŭros averaĝe 5 minutojn. Ili nepre havu viv-elsendotan parton, kie homoj solaj aŭ en familia rondo gustumas la montritan pladon, kiun ili priskribos, kaj ĝi povas havi parton antaŭregistritan kiu montros la pretigadon de la manĝaĵoj.

Limdato por sendado de proponoj estas la 25-a de julio 2020. La organizantoj kontaktos la proponintojn tuj post tiu dato por finaranĝi la detalojn. Bonvolu sendi senprokraste viajn proponojn al vkk@esperanto.org. Bonan apetiton!

Publikigita ĉe: https://uea.org/gk/892

# Partoprenu la enketon de UEA kaj TEJO!




La estraroj de UEA kaj TEJO diskutas la eblon enkonduki monatan membrecon en la organizoj. Ĉiuj esperantistoj, ĉu membro de UEA/TEJO aŭ ne, estas bonvenaj esprimi sin pri la temo, plenigante tiun ĉi enketon pri la avantaĝoj de membreco kaj pagmanieroj por iĝi membro de UEA/TEJO: https://forms.gle/8AUMCbGD8vGs8N4o7

Por ricevi kiel eble plej akuratan reprezenton de la sintenoj inter la esperantistoj, ni afable petas al ĉiuj vaste diskonigi la enketon. Koran dankon!

# 1-a Brazila Reta Esperantista Junulara Kongreso – BREJK




**Pli ol 800 partoprenantoj jam aliĝis al la Virtuala Kongreso de UEA, la plej granda virtuala Esperanto-renkontiĝo de la somero. Invitu viajn familianojn kaj amikojn aliĝi! Ĝis la 26.07 estas senpage por la individuaj membroj de UEA. *https://vk.mondafest.net/***